WIKIPEDIA

Mongola lingvo

La **mongola lingvo** estas aglutina lingvo kaj apartenas al la mongola kaj altaja lingvaroj. Ĝenerale, la mongolan lingvon oni dividas en du grandajn partojn: nordan kaj sudan, kaj multajn dialektojn. Mongoloj en Mongolio, internaj-mongoloj en Ĉinio, burjatoj en Burjata Respubliko de Rusia Federacio, kalmukoj en Kalmuka Respubliko de Rusia Federacio, kaj mogoloj en Afganio kiuj parolas nordan mongolan, sed dauroj, dunsjanoj, tuoj kaj baoanoj en Ĉinio parolas sudan mongolan. Naciaj malplimultoj: kazaĥoj, urjanĥoj kaj ĥotonoj parolas tjurkan lingvon.

Dum sia historio, mongoloj verkis kaj uzis ĉirkaŭ 10 skribojn (alfabetojn). El ili estas uzata malnova mongola skribo dum ĉirkaŭ 1300 jaroj. Alivorte, la malnovan mongolan skribon, skribatan de supre malsupren, oni ekuzis ekde 8-a jarcento pere de sogdoj (kiuj loĝis sur la Silka Vojo en la nunaj teritorioj de Taĝikio kaj Uzbekio kaj estis internacie agantaj komercistoj). La skribo permesis ke en la 12a jct okazis intensaj interŝanĝoj de ideoj kaj inventoj inter Okcidento kaj Oriento[1]. La malnova mongola skribo estas devige instruata en mezaj kaj altaj klasoj de mezlernejoj, ankaŭ en kolegioj kaj universitatoj. Nuntempe (ekde 1940-aj jaroj) oni uzas la cirilan skribon por oficialaj aferoj.

Alivorte, la malnovan mongolan skribon, skribatan de supre malsupren, oni ekuzis ekde la 8-a jarcento pere de Sogdoj (kiuj loĝis inter meza kaj centra Azio). Kvankam nun (ekde la 1940-aj jaroj) oni uzas cirilan skribon por oficialaj aferoj, la malnova mongola skribo devige instruatas en mezaj kaj altaj klasoj de mezlernejoj, ankaŭ en kolegioj kaj universitatoj.

Mongola lingvo

Монгол

Mongol,

Mongγol

Parolata en	Mongolio, Ĉinio (en tuta Mongolio kaj Interna Mongolio, kaj en partoj de la provincoj Ljaŭningo, Ĝilinio, kaj Hejlongĝjango)
Parolantoj	5 2 milionoj
Skribo	cirila alfabeto, mongola vertikala kvadrata skribo, Soyombo alphabet, malnova mongola skribo, latina alfabeto

Lingvistika klasifiko

altaja
mongola
centra mongola lingvaro
mongola

Lingvaj kodoj

Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	mn
ISO 639-2	mon
ISO 639-3	mon
Glottolog	mong1331
Angla nomo	Mongolian
Franca nomo	mongol

mapo pri la lingvoj de la mondo

la vorto "mongola lingvo" mongole

la vorto "vikipedio" mongole

Vidu ankaŭ

- Lingvistiko
- Mongola tradicia alfabeto
- Listo de lingvoj
- Lingva familio
- Mongolio
- Mongola signolingvo

Referencoj

1. ↑ (franca) "Soviétistan, un voyage en Asie centrale (https://lu-cieandco.blogspot.be/2017/02/cent-auteurs-au-passa-porta-festival.html)" (Sovjetlando, vojaĝo en centra Azio), Erika Fatland (tradukita el la norvega fare de Alex Fouillet, Gaïa, 512 paĝoj, 2016. *Sovjetlando-vojaĝo en centra Azio :* alilingvaj rajtoj (https://norla.no/en/books/530) : Danio (Informations Forlag), Estonio (Tänapäev), Finnlando (Siltala Publishers), Francio (Gaïa Editions (http://www.youscribe.com/BookReader/Index/2697578/?documentId=2862416)), Germanio (Suhrkamp Verlag), Barato (hindia kaj bengala lingvoj, Sampark),Italio (Marsilio), Nederlando (De Geus), Polando (Foksal), Rusio (Ripol Classic Publishing Group), Svedio (Leopard Förlag)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Mongola_lingvo&oldid=6474517"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 08:54, 27 nov. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.